

# BRAZILA ESPERANTISTO


OFICIALA ORGANO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

46-A JARO

JULIO — AUGUSTO 1952

N. 460 — 461

VITÓRIA — STATO ESPIRITO SANTO



Palaco Anchieta, sidejo de la ŝtata Registaro (El "Urbo Vitória", eldonita de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko).

## Antologia de Contos Brasileiros

Em continuação à lista já publicada damos uma nova relação de esperantistas que subcreveram antecipadamente exemplares desse importante trabalho:

	<i>Exemplares</i>
Dr. R. da G. Caldeira, Açucena, MG. ....	5
Sr. Misael Alves Mendes, Belo Horizonte .....	5
Dr. Luís de Azeredo Coutinho, Belo Horizonte .....	10
Esperantista Societo de P. Alegre	25
Sr. Hermes Pita, Salvador .....	5
Srta. Débora do Amaral Malheiro, Rio de Janeiro .....	5
Sr. Haroldo Leite Pinto, Itajubá..	5
Sr. José de Barros Moreira, Belo Horizonte .....	5
Sr. Getúlio Soares de Araújo, Rio de Janeiro .....	5
Sr. Arminio de Moraes, Rio de Janeiro .....	10
Srta. Amélia Levy, São Paulo ...	6
Dr. Jado Couto Maciel, Salvador..	5
Sr. Alberto Vigliani, Buenos Aires	7
Grupo Esperantista "Francisco Valdomiro Lorenz" .....	10
Dr. João Baptista Melo e Sousa, Rio de Janeiro .....	5

O livro contará cerca de 300 páginas. A composição, revisão, impressão de uma obra desse gênero demandam naturalmente muito trabalho, cuidado, e não pouco tempo. Todavia podemos esperar para breve o seu aparecimento.

## DEZIRAS KORESPONDI

La gelernantoj kiuj faris la oficialan kurson ĉe la Instituto Municipal de Comercio de Santos, S-roj Alberto Queiroz, Antônio Manoel de Carvalho, Celso Pacheco Amorim, João Pereira Castaldi, José de Moura Ferreira, Norton Rodrigues kaj Wandyr Pardal Medeiros; s-rino Ruth Cleo Fortes de Lima, kaj f-inoj Eunice Nascimento de Oliveira, Iracema de Nardis, Maria Aparecida Pereira da Cunha, Maria José Pereira da Cunha, Maria Passos, Neréa Rodrigues, Nilce Peres Veiga, Norma Rodrigues, Silvia Ramos Salgado, Valdivia Pascale De Cunto, Vilena Rodrigues, Vilma Clide Paino Fortes, Myrian de Domênico, Dilma Serpa da Silva — kun ĉiuj interesatoj pri kutimoj k| a|, precipe per bildkartoj. Adreso: Caixa postal, 785, Santos (São Paulo), Brazilo.

## "URBO VITÓRIA"

La unua paĝo de ĉi tiu numero reproduktas bildon el «Urbo Vitória», eldonita de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistikado por memori pri la 4-a jarcenta festo de la ĉefurbo de ŝtato Espírito Santo.

Kontribuante por la realigo de ĉi tiu iniciato de Brazila Esperanto-Ligo, B. I. G. S. ankoraŭ unu fojon montras sian intereson por la ĉiam pli granda disvastigado de Esperanto, de ĝi alprenita kiel helpa lingvo en ĝiaj laboroj kaj publikigaĵoj, kaj enkondukita en la programon de la Perfektiga Kurso por la statistikoficistoj de la Federacio kaj de la ŝtatoj.

«Urbo Vitória» eliris post «Urbo Salvador» (nun elĉerpita), «Urbo São Paulo» kaj «Urbo Belo Horizonte». Ĝus eliris «Urbo Recife». La serio estas destinita por diskonigi inter la esperantistoj de la tuta mondo la plej rimarkindajn aspektojn de la ĉefurboj en Brazilo.

Por ricevi la 4 haveblajn broŝurojn oni sendu al B. E. L. 10 respondkuponojn.

## CORRESPONDÊNCIA

A B. E. L. ricevas multas kartoj de esperantistoj de la ekstera lando kun petoj de korespondenco por ŝanĝo de seloj, poŝtaj kartoj kaj aliaj aferoj. Ĝi estas natura, ke tiuj esperantistoj ne volas oficiale komuniki kun B. E. L., sed ili volas solumen komuniki kun tiuj esperantistoj brazilanoj kun kiuj ili volas fari la deziratan ŝanĝon de ideoj, informoj aŭ objektoj. Multaj esperantistoj de nia lando volas probable establi tiun ŝanĝon. Sed tamen, petoj de tiuj interesatoj ne devas komuniki kun nia nomo, adreso kaj aliaj informoj, sed ili devas komuniki kun tiuj brazilanoj kun kiuj ili volas fari la ŝanĝon. La *Seção de Correspondência*, kiu nun estas en la B. E. L., devas fari tiun ŝanĝon. A *Seção de Correspondência*, kiu nun estas en la B. E. L., devas fari tiun ŝanĝon.

PLIALTIGU VIAN KATEGORION  
EN BEL-UEA!

# BRAZILA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE BRAZILA ESPERANTO-LIGO

JULIQ-AUGUSTO 1952

46-a Jaro

N. 460-461

## BRAZILA ESPERANTISTO

(«O Esperantista Brasileiro»  
Oficiala organo de

### BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

**A. CAETANO COUTINHO**  
Respondeca redaktoro (redactor principal):

**D-ro CARLOS DOMINGUES**  
Administracio kaj Redakcio:

**Praça da República, 54, 1º**  
Telefono: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZILU

Senpaga por anoj de B. E. L.  
Eksterlande: unu dolaro aŭ 12 respondkuponoj

Quota anual de adesão à  
Liga Brasileira de Esperanto (B. E. L.) e Universal Esperanto-Asocio (U. E. A.)

	Cr\$
AM (membro simples) recebe a carteira de membro, os cupões de serviço e o «Brazila Esperantisto» . . . . .	30,00
MJ (membro com direito ao «Jarlibro») recebe o mesmo que o AM e mais o «Anuário» de U. E. A. . . . .	50,00
MA (membro assinante) recebe o mesmo que o MJ e mais a revista mensal «Esperanto» . . . . .	100,00
MS (membro mantenedor) recebe o mesmo que o MA. . . . .	200,00
Patr. (patrono) recebe o mesmo que o MA. . . . .	1.000,00
DM (membro vitalício) recebe o mesmo que o MA. . . . .	2.000,00

Todas as importâncias devem ser remetidas em vale postal ou cheque bancário à

**LIGA BRASILEIRA DE  
ESPERANTO**

**PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 1º**  
Rio de Janeiro, DF.

## CRESCE A B. E. L.

Rapidamente cresce a Liga Brasileira de Esperanto, já havendo atingido um número de sócios maior do que as outras entidades esperantistas de âmbito nacional de fora da Europa, isto é, já se tornou a maior organização esperantista da América, Ásia, África e quase igual às maiores da Europa.

Com o trabalho perseverante poderemos alcançar o prestígio das poderosas associações europeias, porque realmente nosso movimento nacional é tão ativo como o dos países em que o Esperanto se acha mais amplamente divulgado.

Ao encerrar o ano de 1951, a U. E. A. registava movimento esperantista organizado em 83 países, nos quais o número de sócios quites com a Associação variava muito: em 77 países havia menos de mil sócios em cada; os seis que tinham mais de um milhar de sócios inscritos no ano eram os seguintes:

1º	Grã-Bretanha . . . . .	2.131
2º	Suécia . . . . .	1.734
3º	França . . . . .	1.573
4º	Dinamarca . . . . .	1.202
5º	Brasil . . . . .	1.125
6º	Holanda . . . . .	1.074

Portanto, o Brasil ocupava o 5º lugar e tinha 52,73% de sócios em comparação com o 1º, que era a Grã-Bretanha. Se o nosso patriotismo pudesse concordar com algum lugar que não seja o primeiro para o nosso país, diríamos que ocupávamos um 5º lugar muito honroso, pois que à frente de 78 outros povos; mas o nosso dever é pleitear sempre o primeiro lugar para o Brasil. Com esta finalidade devemos todos envidar nossos melhores esforços.

A nossa associação de âmbito nacional cresce animadamente como trabalho de equipe, no qual cada um dá

o melhor que pode de inteligência, trabalho e cooperação econômica.

Com o crescimento da Liga crescem igualmente e assustadoramente suas necessidades financeiras, daí os nossos apelos aos consócios para efetuarem campanhas financeiras a favor do movimento.

Com o mais sincero reconhecimento registamos hoje os nomes dos primeiros benfeitores que já vieram generosamente em auxílio da nossa instituição:

Allan Kardec Afonso Costa, de Belo Horizonte, MG, com duas apólices de seguro de vida num total de Cr\$ 90.000,00 em favor da Liga; Olavo Cesar Guimarães, de Santanésia, RJ, com donativo de grande quantidade de papel para correspondência e vencimentos de exercícios findos por liquidar; Zenite de Castro Lopes, de Teófilo Otoni, MG, com donativo de Cr\$ . . 1.000,00; e José Varanda, de Petrópolis, RJ, com donativo de Cr\$ 800,00.

Sabemos que estes belos exmplos terão de frutificar, porque já se vai estabelecendo a compreensão das necessidades financeiras da Liga nesta fase de rápido crescimento.

Se o progresso quantitativo é apreciável e o podemos medir com os dados estatísticos destes quinze anos mais recentes, o progresso qualitativo igualmente é muito animador, porque estão surgindo no movimento talentosos jovens esperantistas que se distinguem como poetas, prosadores, propagandistas, entre os mais brilhantes do mundo. A procura de obras literárias em Esperanto cresce dia a dia. Por agora vejamos nosso progresso quanto ao número de sócios brasileiros na U. E. A. nestes quinze anos mais recentes: em 1937 havia 120 sócios brasileiros na organização mundial; em 1938, 118; em 1939, 120; em 1940, 133; em 1941, 132; em 1942, 147; em 1943, 165; em 1944, 265; em 1945, 353; em 1946, 500; em 1947, 476; em 1948, 514; em 1949, 519; em 1950, 563; em 1951, 1.126. E quanto aos sócios de categorias elevadas, que eram pouco numerosos, igualmente nota-se grande melhoramento: a categoria MS, de 1941 a

1951 teve respectivamente: 4, 5, 6, 5, 8, 10, 10, 12, 14, 15, e 39; mas em junho de 1952 já atingimos a animadora cifra de 66; portanto, em seis meses houve um progresso quase igual ao dos três anos precedentes, e absolutamente igual à soma de todos os *Membroj Subtenantoj* dos 12 anos que decorreram de 1937 a 1948. Crescimento em seis meses igual ao de doze anos!

Merece especial menção o fato de haver precisamente dobrado em 1951 o número de sócios do ano anterior, quando só em oito anos dobrou o número de 1937, isto é, em 1944, e só em mais sete anos dobrou o número de 1944. A explicação deste fato é instrutiva: em 1951 os nossos sócios, compreendendo que o Brasil poderia ganhar o Concurso Mundial de Crescimento, trabalharam mais ativamente pela B. E. L., angariando maior número de sócios. Nesse trabalho cumpre registrar os nomes dos Drs. Miguel Timponi e Wilson Veado que muito fizeram para aquele triunfo alcançado pelo Brasil em 1951, dobrando assim o número de sócios.

É muito grande o número de esperantistas brasileiros que ainda não se acham no quadro social da BEL e da UEA e muito fácil será repetir-se a façanha de 1951 — dobrar o número de sócios em um ano — neste ou no próximo ano, desde que todos os nossos consócios o queiram, isto é, compreendam quanto podem os esperantistas fazer quando organizados, conjugando seus esforços, do que insulados, sem trabalho de equipe.

Com o dobro do número de sócios que tem hoje, a Liga poderá melhorar todos os serviços que já presta aos seus sócios e criar muitos serviços novos que estão sendo reclamados.

Necessitamos de muito e variado material de propaganda; precisamos de editar muitas obras e aumentar sempre nossa livraria de obras importadas, porque diariamente aparecem livros de valor em Esperanto; nosso Serviço de Secretaria reclama mais pessoal e melhor material para atendermos à boa vontade que encontramos em

todas as estações de rádio e jornais do País e da qual não nos temos utilizado senão em pequena escala. Tudo isto poderá ser feito com facilidade quando tivermos número apreciável de sócios das categorias mais elevadas.

Todo sócio que possa deve melhorar sua própria categoria e todos devemos esforçar-nos por aumentar o quadro social com as categorias mais elevadas. Com os necessários recursos, o Brasil pode tornar-se o líder do movimento esperantista mundial, e o nosso dever é colocá-lo nessa gloriosa posição.

I. G. B.

## Máximas nas obras de Zamenhof

Teremos lido com o devido cuidado as obras do mestre Zamenhof? Identifiquemos, então, as seguintes máximas, encontradas em várias obras do mesmo glorioso Autor, buscando-lhes os lugares exactos. Em nosso próximo boletim daremos sobre isto perfeita notícia. Muitas outras máximas ocorrem nas obras de Zamenhof e de Kabe: dá-las-emos pouco a pouco, afim de todos enriquecermos nossas expressões deste tipo, fora do excelente «Proverbaro».

1. La homo estas sklavo de la kutimo.
2. Inter la multe da hundoj le leporo pereas.
3. Kiu perdas, tiu ne ridas.
4. Homo ne povas, sed Dio ĉion povas,
5. Sovaĝa pomo eĉ en la paradiza ĝardeno mem neniam fariĝas ananaso.
6. Mortemuloj estas tro malfortaj, por sen kapturino teni sin tro alte.
7. Multe da homoj ne faras malbonon pro timo de mallaŭdo kaj agas bone pro deziro de laŭdo.
8. Neniun oni povas nomi feliĉa antaŭ lia morto.
9. Ĉiu laŭ sia gusto!
10. Maldiligenteco estas la radiko de ĉia malbono.

## LEGOJ PRI ESPERANTO EN BRAZILIO

Du novaj leĝoj pri Esperanto estas sankciitaj en Brazilo, ambaŭ de la Komunumo Coração de Jesus en la ŝtato Minas Gerais. Per la unua la Komunumo aliĝas al la Esperanto-movado kiel Dumviva Membro; la dua donas la nomon Esperanto al publika placo en la urbo. Jen la teksto de la du leĝoj en la nacia lingvo:

### PREFEITURA MUNICIPAL DE CORAÇÃO DE JESUS

LEI N° 67

*Dispõe sobre inscrição da Prefeitura como Sócia Perpétua das Ligas Brasileira e Universal de Esperanto.*

A Câmara Municipal de Coração de Jesus decreta e eu, em seu nome, sanciono a seguinte Lei:

Art. 1° — Fica a Prefeitura Municipal autorizada a inscrever-se como Membro-Perpétuo da Liga Esperantista Brasileira e Associação Universal de Esperanto;

Art. 2° — Fica a Prefeitura autorizada a dispendar até dois mil cruzeiros (Cr\$ . . . . 2.000,00) para atender às despesas decorrentes desta Lei, para efetivação do que dispõe o artigo 1°, ficando desde já aberto o respectivo crédito especial.

Art. 3° — Revogadas as disposições em contrário, esta Lei entrará em vigor na data de sua publicação.

Prefeitura Municipal de Coração de Jesus, 7 de Maio de 1952.

JOSÉ AUGUSTO VELOSO, Prefeito Municipal  
José Alves de Macedo, Secretário.

LEI N° 69

*Dispõe sobre a denominação de uma praça pública.*

A Câmara Municipal de Coração de Jesus decreta e eu, em seu nome, sanciono a seguinte LEI:

ART. 1°) — Fica denominado "PRAÇA ESPERANTO" o logradouro público situado em frente ao local onde será construído o novo edifício do Grupo Escolar, nesta cidade,

ART 2°) — Revogam-se as disposições em contrário.

Prefeitura Municipal de Coração de Jesus, em 7 de Maio de 1952.

JOSÉ AUGUSTO VELOSO, PREFEITO MUNICIPAL.

José Alves de Macedo, Secretário.

## BRAZILA KRONIKO

## PARÁ

**BELÉM** — Nia samideano Lutfala Bitar propagandas Esperanton per la gazetaro. En la gazeto *Estado do Pará* li presigis bonan artikolon pri D-ro Zamenhof kaj lia idealismo.

## CEARÁ

**LIMOEIRO DO NORTE** — Aniĝis al la tiea Esperanto-grupo kaj al UEA Pastro José Falcão Freire ĉe la Dioceza Seminario, kaj Profesoro Pedro Alves Filho, de la urba gimnazio. Ambaŭ klopodos por enkonduki la lernadon de Esperanto en tiujn lernejojn.

## PERNAMBUCO

**RECIFE** — Nia samideano Amaro Pinangé Soares skribis al ni, ke li faras vastan propagandan de nia dua lingvo, disdonante librojn, presaĵojn, precipe al la bibliotekoj, sportaj kluboj k. a., en la ŝtato. Oni helpu lin per sendo de presaĵoj.

**CANHOTINHO** — Fondiĝis en ĉi tiu urbo esperantista rondo, kiu intencas organizi kurson kaj starigi klubon.

## STATO RIO DE JANEIRO

**SANTANÉSIA** — Grupo Verda Stelito de Santanésia, okaze de la unua datreveno de sia fondo, la 11-an de Majo, feste ricevis la viziton de kelkaj samideanoj, reprezentantaj plurajn esperantistajn organizaĵojn el la brazila ĉefurbo.

## PARANÁ

**CURITIBA** — Paraná Esperanto Asocio, kiu ĵus leĝe registris sian statuton, daŭrigas vigle la propagandon de nia lingvo.

## RIO GRANDE DO SUL

**PELOTAS** — Esperanta Societo de Pelotas komunikas sian nunan estraron. Prez. Helmuth Schenk; sekr. Hernani A.

Fernandes Chaves; kas. Osmar Xoeden Reis; bibl. João Vítor Matoso.

## MINAS GERAIS

**BELO HORIZONTE** — Kristana Esperanto-Klubo estas restarigita. Ĝia Sidejo estas unu el la ĉambroj de la Metodista Preĝejo, kie funkcias elementa Esperanto-Kurso.

**JUIZ DE FORA** — La ĉiutaga *Gazeta do Comércio* publikigas, 2 fojojn semajne, Esperanto-kurson kiun direktas nia sindona samideano Kap. Jorge Firmino de Santana.

## RIO DE JANEIRO

En kulturkunvenoj ĉe Associação Esperantista do Rio de Janeiro, laŭ sugesto de S-ro Ismael Gomes Braga, oni studas klasikajn literaturajn verkojn — S-ro Braga komencis la studon per la Zamenhofa traduko de *Hamleto*.

Novaj kursoj ĉe Brazila Klubo Esperanto, gvidita de H. Kocher; ĉe Aliança Divino Pastor, gvid. M. Barbosa Melo; ĉe Associação Esperantista do Rio de Janeiro, gvid. Nelson Sousa; ĉe Cabana do Canajé, gvid. José Cosenza.

STRATO PROF. EVERARDO  
BACKHEUSER

Omaĝante la memoron de unu el siaj plej indaj inĝenieroj, la Ĉefurbestaro de la Federacia Distrikto inaŭguris, la 23-an de Majo, la «Rua Prof. Everardo Backheuser (Eng<sup>o</sup>)».

La nova strato situas en la antaŭurbo Meier, perpendikle je la strato Pedro de Carvalho.

Ĉeestis la inaŭguron la familio de la mortinto, multaj amikoj kaj kolgoj kaj la reprezentanto de Brazila Esperanto-Ligo kaj Brazila Klubo Esperanto.

**SERVIÇO DE LIVROS DE BEL**  
Com este número do B.E. é distribuído o novo catálogo (Julho 1952)

## A palavra "que" e sua tradução em Esperanto

Na língua portuguesa a palavra *que* pode exercer tôdas as funções lexicológicas, exceto a de verbo. Assim, pode ser substantivo, adjetivo, pronome, advérbio, preposição, conjunção e interjeição. Daí, lógicamente dever ser traduzida em Esperanto das mais variadas maneiras, de que damos a seguir alguns exemplos:

### IO

Aquilo tem um quê de novidade — *Tio havas ion novan..* A questão tem seus quês — *La afero havas ion komplikan.* Ela tem um não sei quê, que interessa — *Si havas ion interesan.*

### KIU

O cão que vêdes e os pássaros que ouvís — *La hundo, kiun vi vidas kaj la birdoj, kiujn vi aŭdas.* O homem de que lhe falei — *La viro pri kiu mi parolis al vi.* Que aluno fez isto? — *Kiu lernanto faris tion?*

### KIA

Que barulho! — *Kia bruo!* Qualquer que seja a maneira — *Kia ajn estas la maniero.* Que riquezas incalculáveis estão espalhadas no grande reino da natureza! — *Kiaj nekalkuleblaj riĉaĵoj estas diversitaj en la granda regno de la naturo!*

### KIO

De que se trata? — *Pri kio temas?* Que dizeis? — *Kion vi diras?* Não sei o que o que o Sr. pensa — *Mi ne scias kion vi pensas.* Peço-lhe por tudo que lhe é mais caro no mundo — *Mi petas vin pro ĉio, kio estas por vi plej kara en la mondo* (La Reĝo Judea)

### KIES

A senhora de que vejo o retrato — *La sinjorino kies portreton mi vidas.*

### KIAL

Por que não me responde? — *Kial vi ne respondas al mi?*

### KIAM

Do momento em que o vi — *De la momento kiam mi lin vidis.* Toda vez que venho — *Ĉiun fojon kiam mi venas.* Amaldição o dia em que aquele jovem entrou no palácio — *Mi malbenas la tagon kiam tiu junulo eniris en la palacon.* Ele pergunta sempre por Você, todas as vezes que vem aqui — *Li demandas ĉiam pri vi, kiam ajn li venas ĉi tien.*

### KIE

Foi lá que o vi — *Estis tie kie mi lin vidis.* Em tais ocasiões em que você não sabe se... — *En tiaj okazoj kie vi ne scias ĉu...*

### KIEL

Que formosa é ela! — *Kiel bela ŝi estas!* Oh! que trabalhastes com entusiasmo! — *Ho, kiel entuziasme vi laboris!* Que! a culpa não foi minha — *Kiel! ĝi ne estis mia kulpo.*

### KIOM

Que de perigos! — *Kiom da danĝeroj!* Que de gente estava ali! — *Kiom da personoj tie estis!*

### KIOMA

Que horas são? — *Kioma horo estas?* Que dia é hoje? — *Kioma tago estas hodiaŭ?* — Em que andar êle mora? — *Sur kioma etaĝo li loĝas?* A que horas sai o trem? — *Je kioma horo foriras la trajno?*

### KVAZAŬ

Os olhos dela como que falavam — *Ŝiaj okuloj kvazaŭ parolis.* O céu tinha aspecto de que fora varrido — *La ĉielo as-*

*pektis, kvazaŭ li estus balaita.* Quase que ajoelham, nem que fôra o viático (Castilho) — *Ili preskaŭ surgenuiĝas, kvazaŭ estus la viatiko.*

## KE

Creio que ele virá — *Mi kredas, ke li venos.* Pouco faltou para que Gudmund começasse de novo a chorar — *Mankis malmulte, ke Gudmund ree ekploris* (Junulino el Stormyr)

## OL

Mais yale pouco que nada — *Pli bona io ol nenio.* Mais vale inspirar inveja que compaixão — *Pli bone estas enviigi ol kompatigi* (Z.) Mais vale um amigo íntimo do que um parente afastado — *Pli bona amiko intima, ol parenco malproksima* (Z.)

## ĈAR

Entre, que está chovendo. — *Eniru, ĉar pluvas.* Façam silêncio, que estou escrevendo — *Silentu, ĉar mi nun skribas.*

## ĈU

Que êle queira ou não queira. — *Ĉu li volas, ĉu ne volas.*

## KAJ

Faça a João, que não a mim — *Faru al Johano, kaj ne al mi.* Pergunte-me, que responderei — *Demandu al mi, kaj mi respondos.* Cala-te, que eu me calarei — *Silentu, kaj mi silentos.* Corre que corre — *Kuras kaj kuras; kuradas.*

## SED

Outro que não êle — *Alia, sed ne li.* Maravilha feita de Deus, que não de humano braço (Camões) — *Mirindaĵo farita de Dio, sed ne de homa brako.*

## SE

E' melhor que êle parta — *Estas preferinde se li foriras.* Mesmo que eu qui-

sesse parar, não poderia. — *Eĉ se mi volus halti, mi ne povus* (Z.)

## KVANKAM

Grande que seja a recompensa futura, não compensa o sacrifício presente — *Kvankam estu granda la estonta rekompenco, ĝi ne kompensas la nunan oferon.*

## POR

Tenho muito que fazer — *Mi havas multon por fari.* E já do estio há pouco que passar até o outono (Camões) — *Kaj jam de la somero estas malmulte por pasi ĝis la aŭtuno.*

## Que expletivo

Há expressões em que não é necessário o QUE, entrando nelas apenas para completar ou embelezar a frase:

Talvez que chova — *Eble pluvas.* Quase que morri — *Mi preskaŭ mortis.* Creio que não — *Mi kredas ne.* Que alegria que eu não teria — *Kian ĝojon mi havus.* Que sejas feliz — *Estu feliĉa.* Nós é que não vimos nada — *Ni nenion vidis.* Que Deus o abençõe — *Dio benu lin.*

Em certas frases o QUE não é expressão de realce, mas desaparece, pela maneira de traduzir em Esperanto:

Sem quê nem para quê — *Sen motivo.* Tenho que partir — *Mi devas (bezonas) foriri.* Ele não temia fôsse o que fôsse — *Li timis nenion.* Raposa que dorme não apanha galinha — *Vulpo dormanta ne kaptas kokinon.* Cale o que dá e fale o que recebe — *Silentu donante, parolu ricevante* (Z). Havia gente como quê — *Estis granda kvanto da personoj.* Eis que Ofélia perdeu a razão — *Jen Ofelio perdís la prudenton* (Z).

A. Caetano Coutinho.



## ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

AUSTRIA — Foi eleito Presidente Federal da Austria o Dr. Theodor Körner, ex-prefeito de Viena e esperantista fervoroso.


— “Esperanto — Vojaĝklubo”, de Linz, para exposição, pede material aos esperantistas (cartas, postais, gazetas, etc.). Endereçar ao Sr. Max Hollinger, Gruberstrato 65, Linz Donaŭ, Austria.

— No *Internacia Esperanto-Muzeo* (Museu Internacional de Esperanto), em Viena, foi inaugurado o *Panteono* dos pioneiros do movimento esperantista, organizado pelo Sr. H. Steiner, fundador do *Muzeo*. Compareceu à cerimônia o Sr. Miklas, ex-présidente da Austria e protetor do Museu. No clichê, um grupo de esperantistas,

feito antes da inauguração, em frente à igreja gótica Minoritaten.

Entre as *Esperanto-flaĝetoj* de vários países, já recebidas pelo Museu, conta-se a do Brasil, enviada pela Brazila Esperanto-Ligo.

CHECOSLOVÁQUIA — *Esperantista*, órgão da Esperanto-Asocio da Checoslováquia comunicou em seu número de Dezembro 1951 que este seria o último a ser publicado. O Ministério de Informações reorganizou um plano para edição de gazetas, de sorte que muitas cessaram de existir, devendo ser substituídas por outras. Pelo menos foi esta a desculpa para cessarem as publicações esperantistas no país: *Esperantista*, *Esperantisto Slovaka* e *Esperanto-Servo*.



*Antaŭ la inaŭguro de la Panteono, en Vieno (2-6-51)*

ESPAÑA — O 12.º Congresso Espanhol de Esperanto ocorreu na tradicional cidade de Tarrasa, a 33 Km. a noroeste de Barcelona.

Pela excelente descrição que traz o “Boletín de la Federacion Esperantista Española”, foi de extraordinário brilho e entusiasmo a realização desta manifestação do movimento esperantista espanhol. O próximo congresso espanhol será em Valencia.

ESTADOS UNIDOS — A conhecida revista norte-americana *Life* distribuiu um prospecto de propaganda da revista, em duas colunas, sendo uma em inglês e outra em Esperanto.

FRANÇA — Fundou-se em Paris o “Akademia Esperanto-Klubo”, cujo fim é difundir o Esperanto nos meios intelectuais e estudantis, e utilizar a língua em todos os ramos da ciência e da arte. Fazem parte da diretoria os professores Waringhien, Lapenna e Laurat.

GUATEMALA — O importante diário “El Imparcial” traz extensa secção de noticiário e propaganda do Esperanto, sob a redação de nosso samideano Dr. Jules Bongé, delegado de U.E.A. em Guatemala.

(Continua na pág. 13)

## RECENZO

Henrik Ibsen — PEER GYNT  
— Drama Poemo — kun konciza komentario kaj tri norvegaj popolfabeloj. — El la norvega tradukis Erling Anker Haugen. — 1 vol. 13 x 19 cm., 258 p. — Eldona Rondo, Trondheim, Norvegujo. — Prezo bind. Cr\$ 75,00, broŝ. Cr\$ 50,00 ĉe la libroservo de B.E.L.

\* \* \*

En Oktobro de 1907, per «La Revuo», D-ro Zamenhof konsilis: «estas tre dezirinde, ke ni ne evitu malfacilajn tradukojn, sed kontraŭe, ke ni ilin serĉu kaj venku, ĉar nur tiamaniere nia lingvo plene ellaboriĝos».

Tiun konsilon post 45 jaroj brave plenumis nia klera samideano norvega Erling Anker Haugen per la traduko de tiu ĉi majstroverko de la mondĵiteraturo. Li venkis la malfacilan taskon, al si mem de li truditan, kaj de nun ni fieru, ĉar ni aneksis tian nemorteman verkon al nia literaturo. Ankaŭ ni modestaj esperantujanoj povas ricevi la konsilon de Z. kun malgranda ŝanĝo: «ni ne evitu la malfacilajn poemojn, sed kontraŭe, ni ilin serĉu kaj atente studu, ĉar nur tiamaniere ni ellernos nian lingvon kaj des pli ĝin amos pro ties mirindaj eblecoj.

Ne ĉio estas malfacila en «Peer Gynt». Estas dialogoj tre simplaj, tre kompreneblaj eĉ por komencanto. Jen kelkaj peĉetoj:

«He, diabla fabelisto!  
Kiel vi mensogas! Kristo!  
Tiun saman historion  
mi ekkonis ĝis la fino  
kiel dudekjarulino».

.....  
«Jes, facile povas vi el  
pramensogo fari famon,  
vesti ĝin per pompo brila,  
por ĝin igi versimila.  
Tion faris vi, nur tion,  
faris ŝvelan historion,

spicis ĝin per agloj naĝaj  
kaj aferoj plej sovaĝaj,  
miksitis blagon kaj fabelon,  
pentris faŭkon kaj ĉielon  
tiel ke tutnova sonas  
kion mi jam longe konas!»

.....  
«La jun-domanoj plej ribelis.  
Kun sep el ili mi duelis.  
Mi ne forgesos tiun horon,  
kvankam mi savis la honoron.  
Ĝi kostis sangon, sed la sango  
atestas pri persona rango,  
kaj montras en konfirma senco  
pri saĝa fata providenco.»

En «Peer Gynt» la eminenta pensulo Henrik Ibsen atakas la tiam regantan principon de personismo esprimata per la vortoj «esti si mem», al kiu la diablo. — laŭ la aŭtoro — aldonis «s u f i ĉ e». «Esti si mem sufiĉe» estas la plej grava peko, stulta egoismo. Neniu homo aŭ nacio povas vivi tute sendepende de aliaj; interdependeco, solidareco, amo, sinofero estas fatalaj leĝoj por ĉiuj. La libro aperis en 1867, antaŭ 85 jaroj. Nun *teorie* ni komprenas la interdependecon nepre necesan al la feliĉo de la homaro. Ĝin brave propagandis Roosevelt. Mi aŭskultis kaj memoras unu el liaj diskursoj en tiu ĉi urbo. Interalie li diris: «Dum tuta jarcento ni, amerikaj landoj, kantis la gloron de sendependeco. De nun ni kantu la gloron de interdependeco».

Nur *teorie* ni komprenas tiun interdependecon; politike ni agas stulte aŭtarkie: ĉiu lando fermas siajn teritoriojn kontraŭ ĉiuj ceteraj eĉ multe pli kruele ol en la tempo de Ibsen. Penante plenumi tiun eraran kaj neplenumeban teorion «esti si mem sufiĉe», la mondo malŝparas duonon de sia produktado por posedi grandegajn armeojn, diplomation, komercan reprezentantaron, doganejojn k.a. Kiel suverenaj nacioj ni multe malprogresis ekde la tempo de Ibsen, kiam li surpaperigis siajn ironiaĵojn kontraŭ «esti si mem sufiĉe»; sed paradokse kiel individuoj ni estas pliprogresintaj hodiaŭ; ĉar la vivo pelos nin al la perdo de

nia persona libereco profite de la nacio. La evoluado fariĝas per sklavigo de la individuo al la nacio. La monstra naziismo starigis, ke la individuo estas nenio kaj ĝia popolo estas ĉio. Aliaj ne diras tion, sed agas kun la sama celo. Tiu erara principo pelas la homaron al la plej kruelaj agoj, kreas la plej neplenumoblajn leĝojn en ĉiu lando. Sed malgraŭ ĉio ni progresas kaj ĉiam klare konceptas la interdependecon de individuoj kaj nacioj.

Peer Gynt estas simbolo de la supraĵeca homo, kiu kredeme akceptas ĉion, kion li aŭdas aŭ legas, kaj penas vivi laŭ teoriaj principoj, kiujn li ne scipovas ĝisfunde kompreni; tial li konfuzas veraĵojn kun fabeloj, siajn proprajn pensojn kun realaj agoj, kaj volas esti si mem sufiĉe; sekve li fariĝas nenio, ne taŭgas por la ĉielo nek por la infero, kaj devas esti refandita kiel fiasko dum la fabrikado.

En lia maljuneco, kiam la morto alproksimiĝas, venas al li la Muldisto kaj anoncas:

*«Via tombo estas preta, la ĉerko mendita.  
En la korpo la vermoj sovaĝe frandos.  
Sed mi havas ordonon, sen Lia prokrasto  
la animon venigi en la nomo de P Mastro.»*  
.....*Mi vin refandos.*

La kompatinda Peer serĉas ĉie ateston, ke li estis almenaŭ granda pekulo kaj taŭgas por la infero, se ne por la ĉielo, sed iel ajn li volas fuĝi el la fandejo, ĉar li estas egoista kaj fiera; sed ĉiuj atestantoj neas al li tiun ateston. Post longa traserĉado li venas fine al la kabano de sankta virgulino, Solvejg, kiun li forlasis en la juneco, kvankam ŝi forlasis ĉion karan en la mondo pro li kaj lin adoradas dum la tuta vivo. Certe Solvejg atestos, ke li estas granda pekulo, ĉar kontraŭ ŝi lia peko estas nepardoninda. Li alparolas ŝin kun forta espero havi nun atestanton pri lia taŭgeco por la infero; sed tute kontraŭe, la sanktulino lin akceptas kun plej varma amo kaj patrinece lin gardas ĉe sia sino.

Tiu sankta protekto konfuzigas la muldiston, kiu jam ne kuraĝas plenumi la ver-

dikton kaj jam ekdubas, ĉu Peer efektive povas esti refandita. Li diras:

*«Ĉe la lasta krucvojo, Peer, kunvenos do ni kaj tiam ni vidos ĉu... Mi ne diros pli.»*

Kaj la dramo finiĝas per la kanto de Solvejg patrinece lin kaŝante ĉe sia sino:

*«Mi lulados vin, mi gardos,  
dormu, songu, mia knab'!»*

\* \* \*

Por faciligi la komprenon de la grandioza majstroverko, la klera tradukinto aldonas 38 paĝojn da diversaj klarigoj, en kiuj elstaras tri fabeloj, kiuj multe inspiris la gloran aŭtoron.

Eminenta verko, sur bonega papero, kiun ĉiu esperantisto fieros posedi. Ĝi estos studobjekto por longa serio da kulturkunvenoj de A.E.R.J., kaj espereble aliaj E-societoj ĝin studados en similaj kulturkunvenoj.

Lingvo bonega kaj preŝerarojn ni trovis tre malmultajn, kiujn ni tamen listigas por helpi la legantojn:

pg.	linio	eraro	korekto
8	3	Malebara	Malabara
12	25	fluĝis	flugis
19	20	jen	jes
20	2	Kie	Kien
55	27	malhela.	malhela,
81	24	akuŝi	akuzi
103	29	filosof-	filozof-
104	35	Krojso	Krezo
117	1	ŝi	Ĝi
118	23	grumpus	grimpus
127	8	vizago	vizaĝo
231	32	Malebaraj	malabaraj
237	7	junulioj	junulinoj
240	22	malhavatan	malhavatajn
242	12	konscienco	konscienco
242	21	konsciens-	konscienc-
243	24	komencis	komenciĝis
244	23	kontraudiri	kontraŭdiri
245	5	letere	letero

R. M. Ballantyne — *LA HUNDO KRUSO* — *El la angla lingvo* tradukis J. M. Inman. — Eldono de The Esperanto Publishing Co. Ltd., Rickmansworth, Anglujo. 1951. Broŝ. 150 p. 12 x 18 cm. Prezo ĉe la libroservo de BEL Cr\$ 12,00.

\* \* \*

Kvar tutpaĝaj desegnaĵoj plume faritaj beligas tiun interesan rakonton verkitan antaŭ jarcento, kaj ĝis nun populara en Usono, ĉar la temo estas la plej plaĉa al niaj nordaj najbaroj.

La aventuroj okazas, kiel kutime, sur dezertaj stepoj: ĉevaloj furioze galopantaj; nuboj da sovaĝaj brutaroj kovras la teron; kruelegaj indianoj kontraŭ kristane grandanimaj blankuloj, kiuj ĉion pardonas kaj neniam venĝas. La blankaj herooj ĉiam venkas per bonkoreco, kuraĝo, lerteco, kontraŭ la perfida barbareco de la praloĝantoj.

Tiu rasisma tendenco de la libro memorigas nin pri la ekstermantaj militoj de Josuo kontraŭ la nacioj de la landoj, kiujn la Eternulo donacis (?) al la antikvaj izraelidoj.

La eŭropaj invadintoj en Ameriko kondutis kontraŭ la praloĝantoj en simila maniero kaj ĉiam kalumniis la memoron de siaj viktimoj, senkompate ekstermataj dum tri jarcentoj. Feliĉe tia agado jam apartenas al pasintaj tempoj kaj rasismo nun estus ridinda: nun niaj registaroj protektas la indianojn kaj postulas por ili ĉiujn naturajn rajtojn. La rasismo de la nazioj sufiĉe klare montris la *grandanimecon* de nia propra blanka raso!

La rakonto estas lerte redaktita kaj plaĉas same kiel la usonaj filmoj de similaj aventuroj. Pro la facileco kaj korekteco de lingvo, la libro estas tre konsilinda por esperantistaj knaboj. La prezo estas mirinde malalta kompare kun similaj libroj nun aperantaj en aliaj landoj kaj tio helpas la sukceson de la bela rakonto.

Lingvo, revizio, preso, papero estas bonaj.

I.G.B.

## NEKROLOGO

**CAMILLE AYMONIER**

85-jara, mortis nia eminenta pioniro de la movado esperantista. De 1900 li multe laboris por la propagando de Esperanto, per sennombraj artikoloj en multaj gazetoj kaj ĵurnaloj, paroladoj, bonegaj libroj.

Membro de la Lingva Komitato (1909) kaj de la Akademio (1932).

C. Aymonier verkis dek francajn librojn pri literaturo kaj francaj verkistoj, kaj multajn en kaj pri Esperanto, kies plej konata estas la «Cours Méthodique», en tri volumoj (kun la kunlaborado de Grosjean-Maupin).

Ankoraŭ dum 1950-51 «Franca Esperantisto» publikigis lian interesan verkon «Francaj proverboj».

## ESPERANTO REGAS EN LA KORO DE JESUO

Laŭ la kristana doktrino, la plej perfekta koro, la koro plej arde amanta homaron, estas la koro de Jesuo; ĉar li amis sincere eĉ siajn plej kruelajn malamikojn. Sekve, oni ne povas miri, ke en tia bonega koro Esperanto trovas sian tronon.

En ŝtato Minas Gerais, Brazilo, ekzistas urbo nomata *Koro de Jesuo*, — en nia nacia lingvo «Coração de Jesus» —, kie ĉiuj aŭtoritatoj estas fervoraj esperantistoj, kaj per sia modela agado montras, ke tiu loko estas la koro mem de Esperantujo. La tieaj loĝantoj estas jesukoranoj.

Jen kelkaj faktoj el la urbo dediĉata al la Koro de Jesuo:

Per sia leĝo n-ro 67, de la 7-a de majo, 1952, tiu Komunumo aliĝas al UEA kaj BEL kiel dumviva membro. Ĉu laŭ la Statutoj de niaj organizaĵoj ni povas havi tian nemorteman dumvivulon, estas temo koncernanta ne min, sed Ivon Lapennan.

Per la leĝo n-ro 69, de la 7-a de majo, 1952, la urba Magistrato donis la nomon

*Praça Esperanto* al grava placo en la Koro de Jesuo.

La juĝisto de tiu urbo estas nia Delegito D-ro Wilson Veado; la urbestro S-ro José Augusto Veloso kaj la prezidanto de la leĝfarantaro S-ro Aristides Baptista da Conceição estas Patronoj de UEA (\*); la publika akuzisto D-ro Josefino de Carvalho, la Sekretario de la Komunumo S-ro José Alves de Macedo, la urba impostri-cevito S-ro Júlio Antunes Prates, la advokato D-ro Antonio Pereira de Souza, la urbaj oficistoj S-roj Ranulfo Macedo kaj José Lúcio de Oliveira, la kuracisto D-ro Samuel Barreto, kaj la bienuloj S-roj Herculino Lafeté Rabelo kaj Leolino Matos estas ĉiuj MS; la notarihelpanto S-ro Edson Brasil Lagoeiro estas MA.

La plej agemaj samideanoj en tiu modela urbo estas S-roj José Alves de Macedo, Aristides Baptista da Conceição, D-ro Wilson Veado kaj la urbestro S-ro José Augusto Veloso; sed la tuta loĝantaro simpatias nian movadon kaj por sendi la sumon de la jarkotizoj al BEL, per telegrafa mandato, la ticia Banco de Minas Gerais ne ricevis sendkoston, ĝi laboris senpage, ĉar tia estas la kutimo en Esperantujo.

Se la celo de nia movado estas unuigi la amantajn korojn kaj tiu urbo estas la koro plej arde amanta la homaron, t.e. la Koro de Jesuo, ĉu povus esti alimaniere?

### IGOBO.

(\*) Ĝis 1951 la Prezidanto de la Leĝfarantaro, S-ro Aristides Baptista da Conceição, estis Patrono de UEA, nun li fariĝis Dumviva Membro. — *La Redakcio.*

## ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

(*Continuação da pág. 9*)

— Fundou-se na Capital a Guatemala Esperantista Asocio, sob a direção do Dr. Jules Bonge. Para sua biblioteca, ora iniciada, B. E. L., atendendo o pedido feito pela Asocio, remeteu todas as publicações relativas ao Esperanto, editadas no Brasil.

HOLANDA — O Conselho Municipal de Haia, atendendo à proposta da Haga Esperanto Kontakta Komitato, deu a uma rua da

cidade a denominação “Dr. Ludwig Lazarus Zamenhof”.

INGLATERRA — A Biblioteca Nacional para cegos, em Londres, contém um departamento de obras em Esperanto, com textos em sistema Braille.

ITÁLIA — Segundo nos comunicou a agência jornalística *Stampa Internazionale*, de Turim, o Ministro de Instrução Pública, em circular n. 12.411 de 21-2-952 aprovou o ensino do Esperanto nas escolas da Itália.

IUGOSLÁVIA — Produzido pela empresa “Triglav” está sendo passado na Europa o filme documentário “Ni obeigos la akvojn”, em que todas as descrições das paisagens e da vida do povo são falados em Esperanto. A empresa “Triglav” declarou que produzirá novo filme em Esperanto, se houver em todo o mundo interesse pelo já em exibição. O endereço de “Triglav” é: Zrinjskega ul. 9, Lubljana, Iugoslávia.

JAPÃO — Em Nagoia realizou-se o 38º Congresso Esperantista do Japão. Nele tomaram parte cerca de 200 samideanos. Do Brasil compareceu o Sr. Seiçi Takedo, japonês, diretor da Associação Cultural Japão-Brasil e membro do Conselho da Câmara de Indústria e Comércio de Bauru, o qual leu uma mensagem amiga dos esperantistas de Bauru.

PORTUGAL — A Associação Portuguesa de Esperanto distribuiu circulares, nas línguas portuguesa, francesa, inglesa e alemã, aos Delegados do Pacto do Atlântico, reunidos em Lisboa, chamando a atenção para a solução que representa o Esperanto como língua internacional, para as discussões e trabalhos.

— “Gazeta do Sul”, de Montijo, traz bons artigos sobre o Esperanto, da lavra de nosso samideano M. L. Freitas Clemente e insere o retrato do eminente esperantista Walter Lippmann, há muitos anos residente nos Estados Unidos, onde se especializou como jornalista em assuntos políticos, “bastante conhecido nos meios jornalísticos mundiais pelos seus inúmeros e oportunos trabalhos acerca da situação internacional”.

SUÉCIA — Ao 21.º Congresso de S. A. T., realizado em Estocolmo, compareceram 584 membros, de 12 países diversos. Com a maior ordem e regularidade foi cumprido o programa determinado.

O próximo Congresso deverá ser efetuado em Düsseldorf, Alemanha.

## BIBLIOGRAFIO

PAPO PIO X. BEATA — Verkis *D-ro Adolf Halbedl* — Eld. A. Paolet — San Vito al Tagliamento (Italujo). 110 p. kun pluraj bildoj.

Interesa, kortuŝa priskribo de la vivo de Josefo Sarto (Beppo), naskita en la vilaĝo Riese, provinco de Venecio. Li devenis el tre modesta malriĉa familio. "Tuj kiam li kapablis, li laboris kun la patrino en la domo, kun la patro sur la kampoj, kaj frue li devis ankaŭ partopreni la instruadon en la lernejo de la vilaĝo. La juna laboristo subite fariĝis studento. La vojo en la gimnazon estis unuhora. Piede Beppo faris ĝin ĉiutage kaj por ne damaĝi la multekostajn ŝuojn, li demetis ilin ekster la vilaĝo kaj surmetis ilin nur tuj antaŭ la eniro en la urbeton Castelfranco. Kiu ja konjektis, ke tiu nudpieda studento estos papo?"

Poste, Seminario Tridentino en Padova, kiel stipendiulo; pastro, kaplano, parohestro, kano-niko kaj episkopo; kardinalo kaj patriarko de Venecio, dum naŭ jaroj.

Kiam mortis Leono XIII, Sarto fariĝis papo, sub la nomo Pio X. Post 11 jaroj de pontifika regado, la 20-an de Aŭgusto 1914 mortis la beata Papo Pio X.

—x—

LA NEKONATINO — Novelo de la germana verkisto Reinhold Conrad Muschler. Esperanten tradukita de Ludwig Goppel. Eldonejo de Limburger Vereinsdruckerei — Limburg — Germanujo. 66 p.

Ĉi tiu verko, kiu jam aperis en 9 lingvoj, estas lingve aprobata de la Lingva Sekcio de Germana Esperanto-Asocio.

Tre agrablan legadon oferas ĉi tiu noveleto, pri pasajo de la vivo de franca junulino, kiu pro la morto de sia onklino, kaj sen aliaj parencoj, restante sola en la mondo, decidis forlasi sian hejmurbon Pertuis, kaj vojaĝis, irante unue al Marsejlo. Tie komencis ŝia aventuro, kiu kulminis per ŝia kortuŝa memmortigo en Parizo.

—x—

KARTA ENCIKLOPEDIA — *Kulturhistoriaj kuriozaĵoj*. "La Bosketo" (Whiteway, apud Stroud (Glos.) Anglujo) estas la eldonanto de tre interesaj serioj de kartoj kun bildoj kaj tekstoj pri kuriozaĵoj kulturhistoriaj, el pluraj landoj.

En la 3 serioj jam aperintaj ni mencias kartojn pri Kromleho, gratitaj sunhorloĝoj mezepokaj, lingvo de la perventaj turniloj, meze-

pokaj punseĝoj, menhiroj, skulptitaj trunkabelujoj, bildaj almanakoj k. a.

Kiu deziras ricevi la aperontajn seriojn sendu al "La Bosketo" kelkajn bild (kart) ojn pri popolaj iloj aŭ konstruaĵoj (ekz. muelejo, sunhorloĝo, kalvario, kapeleto, vilaĝa preĝejo, muzea antikvaĵo, aŭ 2 respondkuponojn (por la kartoj), aŭ taŭgan materialon (bildon kaj tekston pri lokaj kulturhistoriaj kuriozaĵoj por publikigo en venontaj serioj.

Ĉi sube ni donas la tekston de la karto pri subakviga punseĝo (angle: duckingstool). "Tiu punilo, uzata por "malvarmigi" la furiozecon de riproĉemaj virinaĵoj dum la jararoj 16 kaj 17, konsistis el brakseĝo kverkligna aŭ pli malofte fera. En ĝi oni sidigis la furion kaj oni fiksas feran bendon ĉirkaŭ ŝi por ke ŝi ne elfalu dum la subakvigo.

La aparato ne aspektis tute same en ĉiu loko. Ekzemple, en Leominster (Herefordshire) la seĝo estis muntita sur ekstremo de baskulo kiu elstaris super la akvo. En Ipswich ĝi pendis per ĉeno de la ekstremo de levilo balanciĝanta sur fosto. En Fordwich (Kent) oni mallevis ĝin per ŝnuro kaj pulio de turnebla argano, konstruita el tri traboj ĉe angulo de la urbodomo.

Kelkfoje la tuta ilo staris apud rivero, lageto, vilaĝa puto; aliffoje la seĝo staris sur radoj, tiel ke oni povis ĝin veturigi tra la stratoj.

Kiam juĝisto kondamnis megeron, li precizigis kiom da subakvigoj oni donu al ŝi. Ekzistas okazoj kiam la puno estis pereiga kaj la mizerulino mortis pro nervoŝoko.

Specimenojn de tiuj punseĝoj oni povas ankoraŭ vidi en kelkaj Anglaj muzeoj, preĝejoj kaj urbodomoj."

—x—

BONN — Prospekto kun mapo de la urbo de Beethoven, ĉe la Rejno, kaj dupaĝa priskribo de ĉi tiu historia 2000-jara urbo.

Senpage havebla ĉe Urba Trafik-Oficejo Bonn — Poststrasse 27-29, Bonn, Germanujo.

—x—

NURNBERG — Prospekto kun la urbplano kaj mallonga rondiro al la vidindaĵoj de Nurnberg, Germanujo.

—x—

ITALA TURISMA KLUBO (Touring Club Italiano). Prospekto kun informoj utilaj al tiuj kiuj havas intencon vojaĝi al Italujo.

—x—

## Sócios graduados de BEL-UEA

Com viva satisfação registramos no corrente ano novos patronos e membros vitalícios, cujos només damos a seguir:

### Patronos

- 1 Maria Salomé de Azeredo Coutinho, Belo Horizonte, MG.
- 2 José Augusto Veloso, Coração de Jesus, MG.

### Sócios Vitalícios

- 1 Aristides Baptista Conceição, Coração de Jesus, MG.
- 2 Prefeitura Municipal de Coração de Jesus, MG.
- 3 Dr. Alcimo Cavalcante de Aguiar, Baturite, CE.
- 4 Dr. J. A. Pinto do Carmo, Rio de Janeiro, DF.
- 5 Pedro Emanuel Simon, Porto Alegre, RS.

### Membros Mantenedores

A categoria de *Membroj-Subtenantoj*, em que se inscreveram em 1951 40 sócios, no corrente ano já conta 66, que enumeramos:

- 1 António Caetano Coutinho, Rio de Janeiro, DF.
- 2 Dr. Carlos Domingues, Rio de Janeiro, DF.
- 3 Cel. Wanderley Francisco Gonçalves, Porto Alegre, RS.
- 4 Secundino Ferreira Passos, Fortaleza, CE.
- 5 Zénite de Castro Santos, Teófilo Otoni, MG.
- 6 Adão Barnabé dos Santos Cavalcanti, Vitória de Santo Antão, PE.
- 7 Francisco Falcão, Belém, PA.
- 8 Major Geraldo Pádua, Rio de Janeiro, DF.
- 9 Irani Baggi de Araujo, Rio de Janeiro, DF.
- 10 Getúlio Soares de Araujo, Rio de Janeiro, DF.
- 11 Pedro Emanuel Simon, Porto Alegre, RS.
- 12 Dr. Miguel Timponi, Rio de Janeiro, DF.
- 13 Carlos Henrique Dionísio, São Leopoldo, RS.
- 14 O. Augusto, Barra Mansa, RJ.
- 15 Francisco Ferreira da Costa Filho, Rio de Janeiro, DF.
- 16 Clara Alvina Zuhlke Juruena, Rio de Janeiro, DF.
- 17 Dr. Edgard Dutra Neves, Rio de Janeiro, DF.
- 18 Lauro J. Costa, Santos, SP.
- 19 Dr. António Gentil Fernandes, Areia Branca, RN.

- 20 Dr. João Neves Piauhi, Salvador, BA.
- 21 C. Poledna, São Paulo, SP.
- 22 José Varanda, Petrópolis, RJ.
- 23 Inácio Matos Quinaud, Pirapora, MG.
- 24 Aníbal de Carvalho, Bebedouro, SP.
- 25 Ismael Gomes Braga, Rio de Janeiro, DF.
- 26 Lubélia de Sousa Brandão, Rio de Janeiro, DF.
- 27 José Gomes Cavaco, Rio de Janeiro, DF.
- 28 A. Wantuil de Freitas, Rio de Janeiro, DF.
- 29 Debora de Amaral Malheiro, Rio de Janeiro, DF.
- 30 Arminio de Moraes, Rio de Janeiro, DF.
- 31 Dr. Adalto José dos Reis, Rio de Janeiro, DF.
- 32 Dr. Belmiro de Medeiros Silva, Rio de Janeiro, DF.
- 33 Manuel Jorge Gaio, Rio de Janeiro, DF.
- 34 Dr. Rui Pinheiro Guimarães, Teerã, Irã.
- 35 J. d'Oliveira Antunes, Rio de Janeiro, DF.
- 36 Zaira Barbosa Barbedo, Rio de Janeiro, DF.
- 3 J. B. Oliveira Cunha, Rio de Janeiro, DF.
- 38 José Moreira, Rio de Janeiro, DF.
- 39 João Correia Severo, Bajé, RS.
- 40 Edith Wehrs, Niteroi, RJ.
- 41 Pedro Nunes Rocha, Franca, SP.
- 42 Cicero Pimentel, São Paulo, SP.
- 43 Dr. José Paulino Alves, Domingos Martins, RS.
- 44 Artur Fernandes de Carvalho Castro, Rio de Janeiro, DF.
- 45 Gabriel Jorge Habib, Rio de Janeiro, DF.
- 46 Dr. Samuel Barreto, Coração de Jesus, MG.
- 47 Dr. Josefino de Carvalho, Coração de Jesus, MG.
- 48 José Alves de Macedo, Coração de Jesus, MG.
- 49 Ranulfo Macedo, Coração de Jesus, MG.
- 50 Leolino de Matos, Coração de Jesus, MG.
- 51 José Lúcio de Oliveira, Coração de Jesus, MG.
- 52 Júlio Antunes Prates, Coração de Jesus, MG.
- 53 Herculano Lafetá Rabelo, Coração de Jesus, MG.
- 54 Dr. Antonio Pereira de Sousa, Coração de Jesus, MG.
- 55 Dr. Wilson Veado, Coração de Jesus, MG.
- 56 Dr. Cádmo de Moura Brandão, Rio de Janeiro, DF.
- 57 José Francelino de Oliveira, Baturité, CE.
- 58 Dr. António de Albuquerque Maranhão, Baturité, CE.
- 59 Ernani Correia, Porto Alegre, RS.
- 60 Heloísa Espindula de Araujo, Vitória, ES.
- 61 Dr. João Batista Melo e Sousa, Rio de Janeiro, DF.
- 62 Allan Kardec Afonso Costa, Belo Horizonte, MG.

- 62 Dr. João Marques da Costa, Salvador, BA.  
 64 Diógenes Benedito Gobbo, Americana, SP.  
 65 Dr. José Raimundo Ramagem Badaró, Salvador, BA.  
 66 Dr. Jaime Martins de Sousa, Joazeiro, BA.

Nosso mais cordial agradecimento a esses dedicados colaboradores.

—:—

Segundo comunicação que recebemos de U. E. A., no Concurso Internacional de 1952 o Brasil ocupava em 30 de Junho o 4º lugar, com 4.518 pontos e 100,4%.

Ao encerrarmos os trabalhos desta edição, já tínhamos inscrito neste ano em U. E. A. 1.443 membros contra 1.126 em todo o ano próximo findo. Tínhamos marcado 5.158 pontos, o que assegura que nos meses vindouros realizaremos folgadoamente o escopo da "Campanha dos 6.000 pontos".

Se de novo venceremos o Concurso Internacional é uma questão cuja resposta depende dos esperantistas brasileiros.

## VIZITANTOJ

BRAZILA ESPERANTO-LIGO plezure ricevis la viziton de la jenaj esperantistoj: Olavo C. Guimarães, el *Santanésia, Rio de Janeiro*; Ronan Castanheira, el *Rio Claro, São Paulo*; Milvar de Meneses, el *Uberlândia, Minas Gerais*; Carlos Henrique Dionísio, el *São Leopoldo, Rio Grande do Sul*; Eurípedes Rocha, Amadeu F. Righetti, Clea Guaraldo, A. Alvarez. Iaiá Vieira, Wanda Maria Siedlecki kaj Rodolfo Peplow, el *Curitiba, Paraná*; Raul Vidal Lemos, el *Natal, Rio Grande do Norte*; Pastro Antônio Borges, el *Salvador-Baía, Hilda Maip, el Ijuí, Rio Grande do Sul*; Rodolfo G. Calógero, el *Buenos Aires, Argentina*; José Guio kaj A. Pedro Marqueta, el *Saragoza, Hispanujo*; Azália Machado Dias kaj Ernesto P. Dias, el *São Paulo*.

## DIPLOMOJ

### NORMA ELEMENTA DIPLOMO

Ricevis la "Norman Elementan Diplomon" post ekzameno farita per korespondado la jenaj esperantistoj:

Alfredo Trindade, *Belém, Pará*; Pedro Nunes Rocha, *Franca, São Paulo*; João Rodrigues do Prado, *Januária, Minas Gerais*; Mariana Pena Soares, *Sele Lagoas, Minas Gerais*; Inácio Matos Quinaud, *Pirapora, Minas Gerais*.

## Deziras korespondi kun brazilaj gesamideanoj:

28-jaraĝa japana komercoficisto, letere aŭ poŝtkart. Jiro Ogawa, 105-2 Honden, Nishiku, Osaka, Japanujo.

21-jaraĝa medicina studento, pri muziko kaj belartoj. Asagaya, Sugunami Poz, Tokio, Japanujo.

28-jaraĝa agronomia studento, pri kemiaj sterkoj kaj specialaj agrikulturaj produktaĵoj. Humitake Ioŝida, 109 Curumaki-ĉjo, Uaseda, Sinjiku-ku, Tokio, Japanujo.

ANGEL TORRENT, pri naturscienco kaj terkulturo: Finca Matamala, San Hilario Sacalm (Gerona) Hispanujo.

ROLF NOTEL, (10b) Chemitz — 14, Nurnbergerstr. 11 Germanujo, 30-jara katolika laboristo en maŝinfabrika, pri ĉiuj temoj, precipe, pri matematiko, geodezio, fiziko, astronomio.

Universitata profesoro pri biologio, S-ro S.Hori, Gumma Universitato, Otsu — Seiooji, Gumma-Ken, Japanujo. 36-jaraĝa.

Pri diversaj temoj: Tadoŝi Inonje, per S-ro Sasanaki, 1º, Higaŝi 3, Hannan, Abeno, Osaka, Japanujo.

25-jara universitata studento, kun brazila fraŭlino, letere kaj bildkarte. Adreso: Furlan Vitomir, Ljubljana, Ŝišenska 12/B, Jugoslavujo.

13-jara knabino, per il poŝtkarto kun samaĝaj lernantinoj. Adr.: Eckerl, Vieno 16, Panikengasse 43/6

Jugoslava universitata studentino, pri ĉiuj temoj. Adreso: Zalssetseh Ijudmila, Douznirje 71 p. Ŝostanj, Slovenija, Jugoslavujo.

## ANONCOJ

— Se vi serĉas korespondadon aŭ interŝanĝadon de ilustritaj kartoĵoj, poŝtmarkoj, gazetoj, libroj kaj kolektaĵoj, aliĝu al ABC-Koresponda kaj Interŝanĝa Klubo. Skribu por prospektoj al Prof. PETRO ZÉVL, Praha X. P. O. Box 40 — Ĉeĥoslovakujo.

— Mi deziras korespondadon kun samideanoj. Dario Soares — Caixa Postal 397 — Pelotas, Rio Grande do Sul.

USE DURANTE ESTE ANO NA SUA CORRESPONDÊNCIA O SELO DA VITÓRIA

— Dúzia Cr\$ 5,00 —